La impresa sukceso de Esperanto

Lastatempe en la interreta Esperanto-gazeto „Libera Folio“ oni iom diskutis pri la disvastigo de Esperanto kaj ĉu Esperanto jam atingis la „sojlan mason“ (aŭ 'kritikan mason'). Tiu nocio venas origine el la atomkerna fiziko; en socisciencoj ĝi priskribas la ekziston de sufiĉa elano en socia sistemo tiel ke la elano fariĝas mem-subtena kaj kreas pluan kreskon. Dum la diskuto mi memoris komparon inter Esperanto kaj aliaj lingvoj, kiun mi iam faris:

Esperanton oni tuj lernis ekde la komenco en 1887, ekde la apero de la Unua Libro. Kvankam oni konsciis, ke ne jam ekzistas lingva komunumo, ke praktike ne ekzistas utilo, la pura ideo de Esperanto - pli facile lernebla lingvo, neŭtrala kaj homfratiga - sufiĉis por igi homojn lerni Esperanton. Zamenhof mem eble supozis, ke 10 milionoj povus signifi sufiĉe grandan sojlan mason (kaj tial li enmetis la subskribofolietojn en la Unuan Libron) - sed ne necesis atingi tiom da subskriboj, multaj homoj tuj eklernis.

Kontraste oni lernas aliajn lingvojn kutime pro iu atendata utilo. Unuflanke, kiam ili jam havas dekojn aŭ centojn da milionoj da parolantoj (do establita internacia lingvo), kaj aliflanke, ĉar temas pri lingvo de lando, kie oni volas komerci aŭ feriadi. (Aŭ eble estas lingvo de najbara lando aŭ la gepatroj kaj lernejoj postulas la lernadon aŭ oni havas lingvistikan intereson.) Ĝis la sojla maso de internacia lingvo, la nivelo de milionoj da parolantoj, ekde kiu ĝi ricevas allogecon por esti lernata de alilingvanoj, nacia lingvo kreskas preskaŭ nur per natura plimultiĝo de la parolantaro tra la generacioj, per kuniĝo de dialektoj al nacia lingvo, per devigo de alilingvanoj en la nacia tereno kaj per akiro de novaj terenoj kaj ŝtatanoj.

Estas fascine konstati, kiom pli alloga estas Esperanto ol naciaj lingvoj, se kompari kun la fakta utilo kaj la grandeco de la parolantaro. Krome tiu pli granda allogeco de Esperanto kondukis al tio, ke Esperanto kreskis ankaŭ praktike multe pli rapide ol ĉiuj aliaj lingvoj. Kutime naciaj lingvoj mortas, kiam ili havas unu parolanton - tiu iam forpasas kaj tiel la lingvo. Kontraste Esperanto disvastiĝis ekde unu sola parolanto ĝis la hodiaŭa nivelo de - depende de persona kredo kaj postulataj niveloj de lingvoscio kaj uzado - supozeble 100.000 ĝis 2 milionoj da parolantoj, ene de nur unu jarcento. Esperanto estis la plej malgranda inter ĉ. 7000 lingvoj en 1887 kaj hodiaŭ troviĝas en preskaŭ ĉiu listo de la 50 plej gravaj lingvoj de la mondo. Google uzas ĝin kaj Firefox, la ĉina registaro ĉiutage publikigas novaĵojn en nia lingvo kaj en Brazilo oni survojigas ĝian enkondukon en la lernejan sistemon kiel elekteblan lingvon. Jen kazo ŝajne senprecedenca en la tuta homara historio. (Se homoj asertas, ke Esperanto ne havis sukceson, ĉu eble iliaj atendoj estas iom altaj kaj ne tre realismaj, konsiderante, ke lingvo estas io sufiĉe kompleksa?)

Eble do la sojla maso ĉe Esperanto estis escepto kaj jam la kreinto Ludoviko Zamenhof kun sia Unua Libro sufiĉis kiel sojla mas(et)o. Ja fakte indas konstati ĉe tiu komparo kun aliaj lingvoj kaj ankaŭ kun aliaj novaj aferoj, ke por la disvastigo de Esperanto ne estis je dispono grandaj rimedoj. La disvastigon de Esperanto plejparte realigis kaj realigas volontuloj fascinitaj de nia lingvo, kiuj deziras kontribui al la ĝia plua progreso. Imprese!

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

(Publikigo – eble kun etaj ŝajnĝoj pro redaktado – en „Esperanto_aktuell“, 2011/03, kiel gastkomento sur la paĝoj de Aŭstria Esperanto-Federacio)